



KURSOJ kaj renkontoj – COURS et rencontres

Université Populaire du Canton de Genève, 23 rue du Vuache,
1201, Genève (derrière le collège Voltaire)
Tél: 022 339 05 00 – Fax : 022 339 05 09

E-mail : info@upcge.ch – Site Internet : www.upcge.ch

Jara kotizo : CHF 50.00 Kursoj : po SFr. 50.00 por unu kurso (semestre)

Loko: Ecole de Commerce de Genève, Nicolas-Bouvier, rue de Saint-Jean 60, CH-1203
Genève, Tel.: 022 546 22 00.

Nivelo I, marde de 18h00 ĝis 19h30 (Sinjorino Pace)

Nivelo II (gramatiko/konversacio), marde de 18h00 ĝis 19h30 (Sinjorino Zoller)

Ĝeneva grupo : Esperanto-Grupo La Stelo, Case postale 734, CH-1212 Grand Lancy 1.
Kontakto : S-ino Christiane Sixtus retroŝte: ch.sixtus@bluewin.ch. La grupo kunvenas de
tempo al tempo en la Maison des Associations, 15 rue des Savoises, 1205 Genève.

JEGG – Junulara Esperanto Grupo de Ĝenevo

Renkontoj okazas unu aŭ du foje monate (merkredon aŭ jaŭdon) ĉe Green Café, 77
boulevard Carl Vogt, Plainpalais, Genève, je la 19-a horo. Por ricevi informojn, bonvolu aliĝi
ĉe : <http://groups.google.com/group/jegg> aŭ sendi mesaĝon al : junularagrup@gmail.com

Laŭzana grupo : Laŭzana Esperanto Societo, Case postale 246 – CH-1000 Lausanne 22.

Tel. 021-729 58 02 Interete : www.alawa.ch/les

Renkontoj ĉiun unuan lundon de la monato je la 20-horo en la Bufedo de la Stacidomo.

CDELI – La Chaux-de-Fonds

Sabataj stud-aranĝoj :

Didaktikaj stud-sabatoj : la trian sabaton de la monato, por ĉiuj esperanto-lernantoj.

Kulturaj seminarioj : la unuan sabaton de la monato, ĝi celas kleriĝon koncerne
historion kaj literaturon de esperanto :

de la 10-a matene ĝis la 17-a posttagmeze

Aliĝo : Nancy Fontannaz, telefono 021 728 31 27 au rete :

nancy.fontannaz@gmail.com

Partopren-kotizo : CHF 15 (stud-sabato), SF 20 (seminario)

Adreso: CDELI, Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-

Fonds. Tel: 032 967 68 42, retadreso : gacond@bluewin.ch

ANNECY, France

Annecy Esperanto

Responsable: Rolande HUDRY – 5 av. de Barral

74960 SEYNOD – Tél. 04 50 51 06 29

Les cours ont lieu le mercredi à partir de 16 h. – Salle Jumel – Quai des Clarisses (à côté
de la Croix-Rouge).



Asocio
Espéranto - Genève - Régions
www.esperanto-geneve-regions.info

LIMSALTANTA FOLIO

vintro-printempo : No. 7, 2013

La asocio Esperanto-Genève-Régions estas translima asocio kiu celas krei ligojn
inter grupoj de Esperantistoj en Pays de Gex, Lago Lemano, Rodanalpo kaj Ĝenevo,
inter aliaj.

La Asocio organizas babilan rondon, La Lunda Grupo, ĉiun lundon ekde la 18-a
horo ĉe la "Brasserie aux Cheminots", 7 rue des Gares, malantaŭ la stacidomo
Cornavin en Ĝenevo (apud la Poŝtoŝtacio Montbrillant).

En ĉi-tiu numero : *Asocia agado, poezio,
ŝercoj, nomoj de bestoj, kaj aliaj interesaĵoj ...*

Por pli da informoj, vizitu nian retpaĝaron :

www.esperanto-geneve-regions.info

Il y a des pages en français! – There are pages in English!

aŭ kontaktu nin

telefone : Charmian +33 (0)450 422 802 retroŝte : charmian@aliceadsl.fr

aŭ Marie +33 (0)450 421 956

kaj en Ĝenevo : Laure 0768614836

Poŝtadreso : 36 parc du Bugnon, 01630 St Genis-Pouilly, Francio

Konto (Svisa Poŝtbanko CCP) : 17-207679-3

Tiuj kiuj deziras, povas kontribui simblan sumon al Asocio EGR de € 3.00 aŭ SFr 5.00 (jare)
– donacoj ankaŭ bonvenas! Por membriĝi, nur demandu kaj vi ricevos membro-karton.

Landaj asocioj :

- **Svisa Esperanto-Societo** : www.svisa-esperanto-societo.ch
Kunprezidantoj: Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets
Tel: 032 932 18 88 retroŝte : mirejo.mireille@gmail.com
Dietrich Weidmann, Archstr. 2, 8610 Uster, Tel: 044 251 50 25
info@esperanto.ch

- **Espéranto-France**, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris
www.esperanto-france.org info@esperanto-france.org

Fonto de la bildo ĉe la frontpaĝo

*Rano estis gardisto, atentigis pri danĝero. Ĝi ofte aperas en la arto kaj fabloj de la
Nordokcidenta marbordo. Arto de Tribo Eta Urso, Nord-Ameriko (Little Bear Art - North
West Coast tribal art). Interrete : <http://www.littlebearart.ca/>*

°°° Ne forĵetu tiun broŝuron, bonvolu doni ĝin al iu alia °°°

Ni kore dankas niajn membrojn kaj geamikojn pro ilia subteno.

Nous remercions chaleureusement nos membres et amis pour leur soutien.

We warmly thank our members and friends for their support.

°°° Ne jetez pas cette brochure, s.v.p. donnez-la à quelqu'un d'autre °°°

La Bona Lingvo

Strigo

Per morna okulo la strigo nin vidas
kaj sidas kaj sidas kaj sidas kaj
sidas.

Ni venas matene, maltaŭge; ni
ĝenas.

Ĝi sidas kaj sidas, silente
malbenas.

Al la nokto malluma la strig'
apartenas.

Dumtage ĝi sidas en tiu angulo

kaj daŭre rigardas per morna
okulo.

"Foriru, taguloj!" silente ĝi petas,
ĉar mia animo en nigro sekretas."

Marjorie Boulton, Eroj

Pluvas

Pluvas kaj pluvas
melankoli',
fluas kaj fluas
sub la foli',
verdo jen dancas
en idili',
sonas ĝojkri'.

Nisimura Masao
el Japano Kvodlibeto

**DEFIO ! SE VI AŬDACAS TRADUKI
LA POEMON 'LA STRIGO', BONVOLU
SENDI ĜIN AL NI, JAM KVAR INTER
NI PROVIS, KAJ NI VOĈDONOS POR
LA PLEJ BONA, KIU ESTOS**

LA MUSETO KAJ LA PASERO de Victor Eftimiu

- "Fratineto, kiom mi amas vin! Vi estas same eta kiel mi, kaj vi estas samkolora. Kiam mi vidas vin venantan malsupren de sur la arbo, por greneroj, ŝajnas al mi, ke mi mem havas flugiletojn."

- "Neniam vi havos flugilojn! respondis superece al ĝi la pasero. Mi ne estas via fratino, kaj mi petas, ne plu nomu min tiel. Tre povas esti, ke mi estas same eta kiel vi, ke mi manĝas la samajn grenerojn kaj estas samkolora; sed ne forgesu, ke mi flugas, dum vi restas sentaŭga museto! Nenio kunligas nin, eĉ ne proksimigas nin almenaŭ. Kaj ni neniam estos kune..."

Edifo. Mi forgesis diri al vi, ke tiu ĉi diskuto okazis en la stomako de la kato.

El la rumana originalo tradukis Tiberio Morariu.

Fonto : Esperanto Krestomatio - <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/uem/0045.php#06>

⌘ Demokratio devas esti io pli ol du lupoj kaj ŝafo kiuj voĉdonas pri kion manĝi por la vespermanĝo.

James Bovard, *Civila Liberulo* (1994)

Verda angulo

Lastminute ! 40 urboj en Hispanujo decidis adopti virtualan monon kaj sistemon de loka interŝanĝo, por kontraŭi la krizon. Fonto : RTS Sviza Radio

2012-10-14 **La kvanto da varoj ĵetitaj povus nutri sepfoje ĉiujn malsategajn loĝantojn en la mondo.**

La legomoj ne estis sufiĉe belaj por esti aĉeteblaj, ili do devis esti detruitaj. Asocio rekolektis ilin kaj kuiris gigantan kareaĵon senpagan por 6.000 personoj por denunci la malŝparadon. Malgraŭ la pluvo, la operacio allogis homamasojn sur la placo de Pariza urbodomo, sabaton je tagmezo. La gapvaguoj vicumis por plado da legom-kareaĵo aŭ glaso de pom-smuzio*, servata senpage.

Prefere ol fini en pistomaŝinon, 400 kilogramoj de tiuj fruktoj kaj legomoj estis disdonitaj senpage en korbetoj, kaj la restaĵojn la organizantoj uzis por kuiru la gigantan komunuman kareaĵon.

En Francio, la nutraĵa malŝparado altiĝas po 2,3 milionoj da tunoj jare en la superbazaroj, kaj 1,5 milionoj da tunoj en restoracioj. La manĝaĵoj juĝitaj maltaŭgaj por vendo finas aŭ en pistomaŝinon aŭ en litroj da klorakvo por ke ili ne estu rekolektitaj en la superbazaraĵoj kompoŝtilojn. Francaj familioj forĵetas po 20 kilogramojn da nutraĵoj jare kiuj plu povus esti konsumitaj.

Entute, la kvanto de varoj ĵetitaj povus nutri sepfoje ĉiun malsategulon en la mondo.

Ŝlosilvortoj : curry géant

*Noto : 'Smuzio' (angle smoothie) estas malvarma deserto el beroj aŭ fruktoj (kutime de unu speco) kun aldono de pecetoj da glacio, suko aŭ lakto, miksitaj per miksaparato. ☆

Pacifika rubovortico

La oceana rubovortico estas nomo por subarktaj kaj subtropikaj vorticoj (cirkuloj, marfluoj) en oceano, kiuj kolektis gigantajn "rubotapiŝon". La Nord-pacifika rubovortico estas la plej granda el la kvin rubocirkuloj (angle „North Pacific Gyre“) kaj havas ankaŭ la kromnomon „Great Pacific Garbage Patch“.

Pro la marfluoj estiĝas subarkta mara cirkulado, en kiu kolektiĝas homa rubo. La surfaco de la ruboinsulo samgrandas kiel Teksaso. Laŭ kalkuloj, komence de 2008 cirkulis ĉirkaŭ 100 milionoj da tunoj de plasta rubo (kun daŭra kresko) en la rubovortico. Ĝi rotacias inter Nord-Ameriko kaj Azio, kaj pelas ĝin Tera rotacio kaj vento. La rubo disiĝas pro la daŭra frotiĝo, marondoj, vento al etaj eroj (3-5 mm). Tiuj etaj plasteroj povas okazigi morton de la maraj bestoj.

Ĉirkaŭ 70 % de ĉiu plasta rubo sinkas al margrundo.

Ŝlosilvortoj : rubovortico, Pacific garbage patch. ☆

Fonto : Manfred Westermayer : AVE - Asocio de Verduloj Esperantistoj
<http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/welcome.htm>

Asocia agado

Esperanto ĉe la Foiro pri Inventoj, Palexpo, Ĝenevo, 10-14 aprilo 2013

Karlota kaj Sonja el Vevey starigis budon pri Esperanto ĉe la Foiro pri Inventoj komence de aprilo. Tiuj du agemaj esperantistoj faris mirindan laboron kun malmultege da spaco - la eta budo estis okul-frapa, multkolora kaj ankaŭ donis multajn interesajn informojn, kvankam ili nur havis lokon por malgranda tablo. Ili bone uzis grandajn afiŝojn kiuj estis videblaj de fore. Eĉ se la budo estis malgranda, ĝi estis meze de la ekspozicio (apud ĉokolad-fabrikisto...) kaj multe da homoj preterpasis ĝin - kaj ankaŭ kelkaj haltis por malkovri ĝin kaj demandi informojn al Karlota kaj Sonja, kiuj tre trafe respondis. Verŝajne, homoj kiuj interesiĝas pri inventoj estas scivolemaj !

Elkorajn gratulojn al Karlota kaj Sonja !

Charmian

- **La Kongresa Temo por la venonta Universala Kongreso en Islando estas "Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvo-komunumoj".**

Agadoj en la vasta mondo !

Tiu superrigardo de eventoj kiuj okazis en la fora mondo ekde la komenco de 2013 montras kiom vere tutmonda estas Esperanto - kaj nur estas eta elekto el la listo de eventoj! *

Januaro

Korea Respubliko : 8a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado, Iksan. Esperantista Asocio de Oonbulismo.

Brazilo : 48a Brazila Esperanto-Kongreso, Barra do Garças, MT. "Esperanto, Kulturo kaj Turismo: Alternativoj por verda ekonomio". Brazila Esperanto- Ligo,

Februaro

Pakistano : 2a Ekspozicio pri Esperanto, Nankana Sahib. 'Lingvo kaj Kulturo' inkluzive de renkontiĝo de Pakistana ILEI-sekcio kaj Junulara Esperantista Pakistana.

Nepalo : 10a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Katmanduo, Nepalo. Nepala Esperanto-Asocio.

Marto

Kubo : Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERO), Santa Cruz del Norte. Klerigaj, fakaj, artaj, distraj kaj sportaj aranĝoj, aktivulaj seminarioj, diskoteko kaj ĉiutaga radioelsendo. Kuba Esperanto-Asocio

Aprilo

Indonezio : Indonezia Esperanto-Kongreso, Wisma Abdi, Bogor. Lernado, ekzamenado kaj kreo de nacia asocio..

Israelo : 7a Azia Kongreso de Esperanto, Jerusalemo, Israelo.

Majo

Kanado : 10a Mez-kanada Renkontiĝo de Esperanto, Otavo, Ontario. Turisma amikeca semajnfino. Esperanto-Societo Kebekia, lige kun Otava Esperanto-Rondo.

* Fonto : www.eventoj.hu

Plurlingva listo de konataj bestoj

<i>esperanto</i>	<i>franca</i>	<i>angla</i>	<i>germana</i>	<i>latina</i>
aligato	l'alligator	alligator	der Alligator	Aligator
apro	le sanglier	wild boar	das Wildschwein	Sus scrofa
azeno	l'âne	donkey	der Esel	Equus africanus asinus
bovo	le boeuf	bull	der Stier	Bos taurus
bufo	le crapaud	toad	die Kröte	Bufonidae
ĉevalo	le cheval	horse	das Pferd	Equus ferus caballus
ĝiraf	la girafe	giraffe	die Giraffe	Giraffa camelopardalis
hundo	le chien	dog	der Hund	Canis lupus familiaris
hamstero	le hamster	hamster	der Hamster	Rodentia muroidea cricetidae
jaguaro	le jaguar	jaguar	der Jaguar	Panthera onca
kato	le chat	cat	die Katze	Felis domesticus
kobajo	le cobaye	guinea pig	das Meerschweinchen	Cavia porcellus
koko	le coq	cock	der Hahn	Gallus gallus
krokodilo	le crocodile	crocodile	das Krokodil	Crocodylidae
kuniklo	le lapin	rabbit	das Kaninchen	Oryctolagus cuniculus
lacerto	le lézard	lizard	die Eidechse	Lacertus
leporo	le lièvre	hare	der Hase	Lepus
lupo	le loup	wolf	der Wolf	Canis lupus
lutro	la loutre	otter	der Otter	Lontra canadensis
melo	le blaireau	badger	der Dachs	Taxidea taxus
muso	la souris	mouse	die Maus	Mus
porko	le porc	pig	das Schwein	Sus
rano	la grenouille	frog	der Frosch	Ranus
sciuro	l'écureuil	squirrel	das Eichhörnchen	Sciuridae
ŝafo	le mouton	sheep	das Schaf	Ovis aries
testudo	la tortue	tortoise	die Schildkröte	Testudinidae
tritono	le triton	newt	der Molch (der Wassermolch)	Salamandridae pleurodelinae
vulpo	le renard	fox	der Fuchs	Vulpus

Fanfaronado

Kruko fanfaronas al Baniko, ke li estas tre fama homo.

Baniko nur ridas. Do Kruko telefonas al la urbestro.

"Saluton Marko, kiel vi fartas?"

"Dankon, bone, Kruko", respondas la urbestro, "Ĉu vi deziras ion specialan?"

"Ne", diras Kruko, "iu amiko ne volis kredi, ke vi konas min. Bone, mi deziras al vi plu bonan tagon. Ĝis revido."

Baniko restas tamen skeptika, do Kruko telefonas al la ŝtata prezidanto.

Tre simila telefona interparolo. Baniko tamen ankoraŭ pridubas la konatecon de Kruko.

Kruko do diras: "Eĉ la papo konas min. Ni faru vojaĝon al Romo, vi vidos."

Alveninte en Romon, Kruko diras al Baniko, ke tiu restu sur la placo de Sankta Marko kaj ke li ja vidos lin poste supre sur balkono kun la papo.

Kruko vere aperas tie kun la papo kaj fiere revenas al Baniko.

Tiu estas iom pala. "Diru, kio okazis?", demandas Kruko.

"Nu, kiam vi staris tie kun la papo, mia najbaro demandis al mi:

'Ĉu vi hazarde scias, kiu estas la homo tie supre apud Kruko?' " ☆

Danĝera estas vivo de farmacisto

lun tagon, Irlandano eniris apotekon. Li metis manon en sian poŝon, eliris malgrandan flakonon kun kafkuleron, verŝis iom da likvaĵo sur la kafkuleron, kaj transdonis ĝin al la farmacisto.

"Ĉu vi bonvolus gustumi ĉi tion por mi, mi petas?"

La farmacisto prenis la kafkuleron, metis ĝin en la buŝon, kaj glutis ĝin. Ĝi gustis malagrabra.

"Laŭ vi, ĉu tio gustas dolĉa?" demandis Patriko.

"Ne, tute ne" respondis la farmacisto, farante grimacon.

"Ho, tio ja trankviligas min" diris Patriko. "La kuracisto diris al mi, ke mi venu ĉi tien por kontroli mian urinon pro sukero." ☆

Kuraĝulo

Enirante bankon, rabisto tiras maskon sur la vizaĝon. Tamen, 2 homoj jam ekvidis lian vizaĝon, tial li mortpafis ilin por ke ili ne kapablu priskribi lin.

En la banko staras malgranda, tiranita viro kun sia batalema edzino.

Minacgrumble la rabisto demandis al ili: "Ĉu ankoraŭ iu vidis mian vizaĝon?"

La viro balbutis: "Ne mi ... sed eble mia edzino." ☆

Murda mistero - vera rakonto

Fakulo pri jura scienco rakontis tiun nekredoblan rakonton: la 23-an de marto 1994 la medika ekzamenisto kontrolis la korpon de Ronald Opus, kaj konkludis ke li mortis pro kuglovundo ĉe la kapo. Sinjoro Opus estis saltinta de la alto de 10-etaĝa konstruaĵo kun intenco mem mortigi. Li lasis leteron en kiu li priskribis sian deprimon.

Dum li preterfalis la naŭan etaĝon, interrompis sian vivon kuglo el pafilo kiu pasis tra fenestro kaj instante mortigis lin. Nek la pafisto, nek la mortinto sciis ke sekurec-reto estis instaligita tuj sub la oka etaĝo por protekti konstru-laborantojn kaj ke Ronald Opus ne estus sukcesinta sian mem-mortigon tiel ke li estis planinta ĝin.

La ĉambro je la naŭa etaĝo, de kie venis la pafo, estis okupita de maljunulo kaj la edzino. Ili arde argumentis kaj li estis minacinta ŝin per pafilo! La viro estis tiom emociigita ke, kiam li pafis, li tute maltrafis la edzinon, kaj la kuglo trairis la fenestron, kaj frapis Sinjoron Opus.

Kiam oni intencas mortigi personon A, sed mortigas personon B dum la provo, oni kulpas pri la murdo de persono B.

Kiam ili estis alfrontitaj al la murda akuzo, la maljunulo kaj lia edzino ambaŭ vigle asertis ke la pafilo ne estis ŝarĝita. La maljunulo diris ke estis longdaŭra kutimo minaci la edzinon per senŝarĝita pafilo. Do li tute ne intencis murdi ŝin. Pro tio la murdo de Sinjoro Opus ŝajnis akcidento, tio estas, se oni premias ke la pafilo estis akcidente ŝarĝita.

Post enketo, oni trovis atestanton kiu vidis la filon de la geparo ŝarĝi la pafilon ses semajnojn antaŭe. Oni malkovris ke la patrino ĉesis financan eltenon al la filo, kaj la filo, sciante kiel la patro uzis la pafilon, ŝarĝis ĝin kun atendo ke la patro pafus la patrinon.

Por tio, li kulpis pri la murdo eĉ se li ne tiris la ellasilon. Do la filo kulpas pro la murdo de Ronald Opus.

Nun venas la vere nekredobla parto de la rakonto - la enketo malkaŝis ke la filo estis ... Ronald Opus.

Li iĝis pli kaj pli deprima pro la malsukceso de sia provo okazigi la murdon de la patrino - do li finfine saltis de la 10-etaĝa domego ĝustatempe por esti mortigita per pafilkuglo transirante tra la 9-a etaĝa fenestro.

Konklude, Ronald Opus fakte sin murdis. Do la medika ekzamenisto prononcis la kazon kiel mem mortigo.

Fonto: *Interreto: En 1994, okaze de prezento de premioj pri Jura Scienco en Usono, Dr. Don Harper Mills, Prezidanto de AAFS prelegis pri tiu stranga kazo de leĝaj komplikaĵoj. Enesperantigis Charmian Common kaj la Lunda Grupo* ☆

☞ Doni monon kaj povon al registaro estas samkiel doni viskion kaj aŭtoŝlosilon al adoleskaj knaboj.

P.J. O'Rourke, Civila Liberulo

Ni estas grupo de novaj esperantistoj, por tio okazas ke ni eraras. Do, se vi trovas erarojn, ni estos dankemaj se vi bonvolus atentigi nin!

Grupeto da amikoj - ĉiuj novriĉaj - troviĝas en ŝvitbanejo. Portebla telefono tintas.

Iu el la amikoj etendas la brakon, prenas la telefonon kaj respondas "Alo".

Tuj virina voĉo ekparolas, preskaŭ senspire, dirante: "Karulo! Mi havas etan demandon. Mi ĵus vidis belegan peltmantelon, nur 10,000 spesoj. Ĉu aĉeti?"

"Jes ja, aĉetu!"

"Kaj mi havas plian demandon. Mi vidis ankaŭ mirindan diamantringon, vere nemultekostan, nur 20,000 spesoj? Ĉu aĉeti?"

"Neniu problemo, aĉetu!"

"Kaj lasta demando. Mi trovis ŝikan Mercedes-on, ĝuste kia plaĉas al vi, por nur 30,000 spesoj. Laŭ vi ...?"

"Nu, Mercedes-o. Kial ne? Aĉetu!"

"Ho, dankon, dankon, mia karulo. Ĝis baldaŭ."

Li elŝaltas la telefonon kaj demandas: "Kies tiu ĉi telefono?" ☆